

ESPERO KATOLIKA

Oficiala monata organo de la Internacia Katolika Unuiĝo. Esperantista (I.K.U.E.) fondita de Abbé Richardson en 1910 en Parizo.

Redakcio kaj administracio: Espero Katolika-VLEUTEN (Utrecht). Nederlando. Jarabono f 4.50 aŭ samvaloro.

Kunlaborantoj: d-ro E.J.Görlich (Aŭstrujo), Robert Ernst, sac. (Belgujo), Ludwig Thalmaier, sac. (Germanujo.) J.Vernoux, sac (Francujo.) Eusebio. Maynar (Hispanujo), Prof.H.G.Wannemakers S.J., G.Ellerman kaj d-ro W.J.A.Manders (Nederlando), d-ro W.Solzbacher (Usono.).

1 FEBRUARO 1953.

Dio restis sola.

Je la unua de Februaro pasinta malfeliĉego trafis Nederlandon. Pelinta de nordokcidenta ventego el la Atlantiko la maro altiĝis en la suda parto de la Nordmaro kiel neniam antaŭe. La digoj en Nederlando, Belgujo kaj Anglujo rompiĝis, ekestis katastrofo, ja pli ol tio, vera kataklismo. El ĉiuj partoj la delto de la Rejno suferis plejmulte. Dek procentoj de la Nederlanda teritorio, 135.000 ha. subakviĝis, centmiloj da kulturbestoj dro- niĝis, miloj da farmoj ruiniĝis, sed plej grave 1500 personoj trovis teru- ran morton, kaj la vivantoj vidis tion, nepovante malhelpi tion. La nombro de droniĝintoj estas pli ol dufoje la nombro de viktimoj de la bombardado de Rotterdam en 1940! Multaj personoj restadis longe en arboj kaj sur teg- mentoj kaj luktis kontraŭ la naturo, batalis kontraŭ Dio por savi la korpan vivon, kaj se necese por savi la eternan vivon. Solaj ili estis, kaj multaj havis la impreson ke la fino de la mondo alvenis. Dank' al la helpo de la tuta mondo multaj vivoj estis savitaj, kiuj en antaŭaj jarcentoj certe es- tis perdontaj. La doloro en la familioj, en la tuta lando ne estas priskrib- ebla. Vilaĝoj kaj urbetoj devis evakui, kaj en Nieuw-Vossemeer la urbestro kiel lasta forlasis sian grundon. Ne estis okazo savi la Sanktan Sakramen- ton el la preĝejo. Dio restis sola meze de la akvoj.

Rompita fiereco.

Ofte ni vidis la miritajn vizaĝojn de alvenintaj vojaĝantoj sur la flughaveno Schiphol apud Amsterdam, kiam ili legis la grandajn leterojn sur la trafik- turo, kiu komunikis ke ili staras 4 metrojn sub la marnivelo. Dio kre- is la teron, sed la Nederlandanoj al si faris la patrujon! Ni vivis sekure malantaŭ niaj digoj, en niaj polderoj, sur la iama marfundo. En niaj muzeoj ni havis pentraĵojn kiuj montris akvo-katastrofon. Homoj kaj bestoj en mor- ta lukto, kvazaŭ en la tempo de Noaĥo. Ni preterpasis ilin, ĉar ni opiniis ilin tro romantikaj! La realeco estas multe pli akra! Forrompiĝis nia nacia fiereco. Amerikanoj, angloj, belgoj, italoj, germanoj, kiuj vokis nin por fari havenojn, digojn, polderojn, ktp. nun alkuris por savi nin el la akvo! Ĉu nia famo estos for! En humileco ni metis nian laboron en la manojn de Dio, kiu kreis ĉion. Pli humile ni akceptis la petojn el la eksterlando por ankaŭ en la nunaj cirkonstancoj sendi niajn specialistojn por forpeli

la akvojn. Kaj ĉar pruviĝis ka la modernaj digoj ne suferis pro la akvo, la katastrofo estis instigo por ankoraŭ plimalproksimen puŝi la nacian malamikon, la akvon, por elŝiri ankoraŭ pli da tero el la marfundo. Ĝis tiuj laboroj estos pretaj, kaj certe daŭros kelkdekojn da jaroj, ni ne estos sekuraj. Tamen kun la helpo de Dio ni sukcesos.

Eŭropo vivas!

Ŝtatestroj, ministroj kaj parlamentanoj kunvenas kaj parolas kaj serĉas vojojn por doni al Eŭropo novan formon, ekonomian, kulturan, politikan. Kaj ofte oni malesperas ĉu ili sukcesos. La landlimoj ŝajnas esti tro fortaj, la doganbaroj tro malfacilaj, ktp. Kaj jen, de ĉiuj direktoj alvenas helpo, sur la internaciaj vojoj, fervojoj, riveroj kaj trans la maro. Ni ne povas eldiri kiom dankaj ni estas! En siaj armeoj, trafiko, karito kaj ekonomio Eŭropo estis unu, malgraŭ la malfacilaĵoj de la politikistoj, kaj pruviĝis ke la baroj inter la popoloj ne ekzistas. Ni ĝojas pro tio.

Nia stato.

Ni ricevis multajn leterojn en kiuj oni esprimis sian kompaton kun la viktimoj kaj la deziron ekkoni nian staton. Feliĉe ni povas komuniki ke en Nederlando ĝis nun neniu el niaj membroj suferis pro la subakviĝo. Ankaŭ nia oficejo ne estis trafita, kaj mi devas aldoni ke krom la perdoj de homaj vivoj, la difekto nur rilatas nian agraran pozicion, kaj ke la industria kapableco de nia lando restis intakta. Certe diversaj familioj, ankaŭ de ni, katolikaj esperantistoj, devis priplori la perdon de kelkaj familianoj. Ni petu vin preĝi por la animoj. Ĉu la katastrofo neniel rilatas nin? Certe jes! Unu el la viktimoj estas la diocezo de Haarlem, kiu perdis diversajn preĝejojn. Kaj dum la lastaj jaroj ĝi devis konstruigi multajn novajn preĝejojn pro la perdoj dum la milito kaj pro la plinombriĝo de la popolo. Tiu diocezo nin helpis diversfoje kiam E.K. havis malfacilaĵojn. Baldaŭ ni sendos al niaj membroj specialan cirkuleron pri tio. Fine ni tutkore dankas ĉiujn, kiuj sendis al ni leterojn kaj kiuj helpis per donacoj alla internacia helpo. Speciale ni volas mencii la helpon de Germanujo, ĉar tiel diversaj malfacilaĵoj inter niaj popoloj kaŭze de la milito, malaperis. (inter la faktoroj, kiuj kaŭzis tian grandan katastrofon, certe estas tiu de nebla supervizo kaj provizo de niaj digoj pro la okupacio) Alia agrabla helpo estis tiu de Aŭstrujo, el kies popolo multaj personoj pasis kelkajn jarojn de sia juneco en Nederlando, kiam en 1918 trafis al ili malŝatkatastrofo kaŭze de la milito de 1914-18. Kaj trie ni volas speciale mencii la dankagadon de Italujo, en kies Po-regiono antaŭ unu jaro okazis ankaŭ akvokatastrofo, kaj tiam la Nederlandanoj helpis ilin. Bonvolu permesi ke ni ne donas priskribon de la okazintaĵojn, kiujn vicerte povas vidi en viaj revuoj kaj kinoteatroj, sed ni petas vin disaŭdigi nian sinceran dankon!

J.

U N I V E R S A L A K O N G R E S O E N Z A G R E B .

Al katolikaj partoprenantoj de tiu kongreso ni komunikas ke I.K.U.E. tie ne organizos oficialan religian kunvenon, nek oficialan kunsidon. Tio al ni ne estas ebla en lando, kie la religio ne estas libera, kaj kie mons-ro Stepinac, de antaŭ nelonge Kardinala Moŝto, ĉefepiskopo de Zagreb, estas kaptito de komunista registaro. Ke ni ne estas solaj en nia sinteno, oni povas konstati el la reakcio de la anglaj kristanoj kontraŭ la oficiala, vizito de marŝalo Tito ĉe la angla registaro. Ankaŭ ni konstatas ke KELI ne kongresas en Jugoslavujo, sed en Svisujo. I.K.U.E. kunvenos en Lourdes. Post kelkaj monatoj ni publikigos la eblecojn por ĉeesti sanktajn mesojn en Zagreb.

* * *

Por sistema aplikado de esperanto

Jam dum multaj jaroj ni, Esperantistoj, propagandas kaj instruas kaj miloj da personoj el plej diversaj landoj lernis la internacian lingvon. La rezulto ne estis daŭra ĉe la plimulto el ili pro tio ke ili ne trovis daŭran aplikon de sia lingvoscio.

Tamen Esperanto venis en mondon ĉiam pli internaciigantan. Jam ekde ĝia apero ekzistis multaj internaciaj organizoj ĉiuspecaj, kiuj ĉiuj urĝe deziris internacian komonikilon por ebligi fluan, efikan, celtrafan laboron. Kaj tamen ili ne akceptis Esperanton! La nombro de internaciaj organizoj kaj institucioj kreskas ĉiutage, ilia laboro ĉiam pli intensiĝas kaj komplikiĝas, kaj la manko de internacia lingvo ĉiutage pli akre sin sentiĝas. Tamen Esperanto ne estas sufiĉe konata, eĉ malpli aplikata!

Kiu estas la kaŭzo de tiu stranga situacio, kiu senidealigas ambaŭ Esperantistojn kaj celantojn al internacia kunvivado?

La konstato mem enhavas la respondon! Ekzistas du diversaj grupoj: Esperantistoj kaj celantoj al internacia kunvivado, kiuj ne sufiĉe interrilatas Esperanton ne jam servas la internacian mondon. Kio necesas por aliigi tiun situacion, kiu minacas la ekziston mem de Esperanto kaj de la fruktodona internacia vivo? Estus facile diri ke ĉiuj sur internacia tereno aktivuloj lernu kaj apliku Esperanton. Tiel ni, Esperantistoj, forŝovas la ŝarĝon sur la ŝultrojn de aliaj, kaj kvazaŭ mem senkulpa lavas niajn manojn. Estas ĝuste nia tasko ne nur propagandi, instrui sed krome: enkonduki kaj apliki.

La manko troviĝas ĉe ni, en niaj propraj rondaj: ni ja bezonas homojn, kiuj konas la internacian vivon en ĝiaj multaj diversaj formoj. Internacie ni helpu unu la alian por ekkoni la situacion de tiuj landaj asocioj, kiuj akcelas internacian vivon. Kaj ju pli ni havos tiun ĉi scion, des pli ni povos ĝuste kaj celtrafe proponi iun oportunan aplikon de Esperanto.

Niaj Esperanto-revuoj do daŭre publikigu la sciigojn el diversaj landoj, kiuj montras kiel oni serĉas internacian kunlaboron kaj tiel disdonu taŭgan studomaterialon por la Esperantistoj.

Estu la rezulto, ke post iom da tempo oni agnoskos ke multaj homoj, kiuj ĝuste prijuĝas la situacion de la internacia vivo estas Esperantistoj. Tiel en internaciaj rondoj ili povos paroli kaj fine proponi kaj enkonduki paŝon post paŝo nian lingvon.

Por fari komencon de tiu dokumentado ni citos en sekvanta numero artikolo pri parolado de Papa Moŝto Pio XII al la Itala Katolika Agado.

Nur konstanta kaj persista studado de la evoluo de la internacia vivo faros nin taŭgaj por nia propra tasko!

H. G. Wannemakers S. J.

RECENZO

Letero el la Transcendo, de A. B. Krempel, el germana originalo tradukis Max. M. Mielert, Eldonis: Limburger Vereinsdruckerei, Limburg (Germanujo). 36 paĝoj, broŝurita. Prezo: 1.20 DM + 10% afranko. (ĉe nia Libroservo f 1.20 aŭ 6 Int. Rk. aŭ egalvaloro.)

Temas pri letero, kiu iu ricevis de bona amikino, kiu sin trovas en la infero. Estas nur fikcio, ĉar kondamnitaj animoj ne skribas leterojn. Tamen la enhavo estas tiel riĉa, tiel signifoplena kaj psikologia karakteranalizo, tiel klara ke ĝi estas plencerte leginda. Ni, vivantoj en la batalo kontraŭ la malbona spirito, povas multe profiti pri tiu revelacio. La tradukinto faris tre bonan laboron kaj ni esperu sukcesplenan apostoladon.

La traduko estas altnivela, akurata kaj facile legebla.

La lastaj paĝoj donas teologiajn citaĵojn, rimarkojn pri la temo.

La libreto estas bone presita kun alloga ekstero. La titolpaĝon desegnis Heinz Schneider el Heubach. Ni povas rekomendi la legadon al ĉiuj.

A. Beckers, sac.

Friedrich Dessauer

La 19. 7. 1951 Friedrich Dessauer festis sian 70-an datrevenon de sia naskiĝo. Kiu li estas, oni ekkonu el la artikoleto en 'Blick in die Zeit' Berlin, kiu informas jene: 'Se oni konsideras, ke la Dio en la naturo ne povas kontraŭi al la Dio de la supernatura revelacio, tiam la homo en la kosmo ne estas la estulo de la neigema ekzistofilosofio, ŝargita per zorgoj, transdonita al la nenio, al la senceco. Li trovas apogon por siaj etenditaj brakoj, respondon al sia voko, lumon por sia explorema spirito. Li ne renkontas mutan rifuzon per blindaj, stultaj leĝoj, ne vidas nur eterne malklarajn cifrojn, sed sentas sian vidalvidulon, kiu similas al li, kvankam kun senlima superpotenco. En la sekundo de la renkonto li sentas vivan alspiron, li opinias rigardi en nekomprenoble majestan vizaĝon. Ĉi tiuj vortoj en la libro 'Religion im Lichte der heutigen Wissenschaft' (religio en la lumo de l'hodiaŭa scienco) stampas la plej kernan interesigon kaj aspiradon de Friedrich Dessauer, de tiu ĉi granda esploristo de la naturo, la modernan sciencan pri-naturan solvi el ĝia spirita soleco, kaj instrui, ĝin reerigardi en ĝia kuneŝto en la vido al la tuta kreitaro. Kun filozofio kaj religio Dessauer celas la retrovon de la rilatoj kaj kunecoj, kiujn ne pli devi rekoni la 'senkondiĉa' scienco opiniis. Por Dessauer la laboro de la naturo esploristo estas suprenirado al la altaro de Dio inter la kreaĵaro kaj frapetado al la tabernaklo de la natura revelacio. Kun ĉiu nova trovo dum sia longa vivo esplorista blovas al li spiro el la senfino. En la laborejo Dessauer aŭdas la voĉon de la spirito.

Nun aldoniĝas komuniko, kiu pensigu la oficialajn reguligistojn de la naskoj en Japanujo kaj Hindujo, senditaj de UNO, kiuj, sen ia aŭ ĝusta fido en Dio persona, provas ĝeni ties planon kaj per sia tentado nur plimalfeliĉigas la jam malbonstatajn naciojn, sciuj. Ĉi tiu granda natursciencisto Dessauer estis la **naŭa** inter dek infanoj de malnova familio en Aschaffenburg. Junaĝa li jam malkaŝis en si nekutiman talenton por teĥniko kaj dediĉis sian tutan inklinon al la esplorado kaj al la entreprenema risko en la ekonomio. Kiel unuan li establis en Aschaffenburg sian laborejon por la esplorado de la sfero inter medicino kaj fiziko. La konstruado de aparatoj laŭ Röntgen kaj esploroj en la sfero de la radi - kaj alttense teĥniko estis tiam la ĉefa agado de la juna fizikisto, kiu ankaŭ sukcesis, fari Röntgen-bildojn de la pulsanta koro kaj spiranta pulmo. Poste sekvis sukcesintaj esploroj kaj trovoj sur la kampo de la Röntgen-a profundterapio.


De 1920 ĝis sia forpeliĝo en 1933 Dessauer agadis kiel direktoro de l'universitatoinstituto por fizikaj fundamentoj de la medicino ĉe la universitato Frankfurt sur Main. La instituto, fondita de li, fariĝis poste la 'Kaiser Wilhelm Institut'. Fakasocioj en multaj landoj nomis Dessauer honora membro. Krom sciencisto Dessauer estis ankaŭ membro de la Zentrum-partio kaj parlamentano kaj fariĝis ekonomia konsilisto de la regna kanceliero Dr. Brüning. De 1934 Dessauer laboris ĉe la Ŝtatuniversitato Istanbul kaj tie establigis la instituton por radiologio kaj biofiziko. 1937 li akceptis la inviton de la universitato Fribourg (Svisujo), kie li laboras ankoraŭ hodiaŭ kiel ĉefprofesoro de fiziko kaj krome verkadas abunde.

Dr. A. H.

Aldono de la Redakcio: La supre skizita scienculo, kiu laboris sur la bazaj terenoj de fiziko kaj biologio estis (mirakle!) famkonata ekonomo. Li kreis la doktrinojn de la kooperativa ekonomio, en kiuj li skizis la kunlaboron de 7 faktoroj, nome: 1. entreprenisto, 2. laboristo, 3. help-entreprenisto, (kapitalisto), 4. konsumentoj, 5. ŝtato, 6. naturo, 7. teĥniko. La rezulton de ĉi tiu ekonomia kunlaboro li rigardis el la vidpunkto de solidarismo. Jen antaŭ jaroj jam la skizo de nia moderna katolika sociologio, ellaborita en diversaj papaj enciklikoj.

* * *

NEDERLANDA



KATOLIKO

NEDERLANDSE ROOMS KATHOLIEKE ESPERANTISTENBOND.

OPGERICHT 29 AUGUSTUS 1909.

Voorzitter: L.G.C. de Jong, Utrechtseweg 81, VLEUTEN.
 Secretaresse: f-ino T.Durenkamp, Kasperspad 91, Dordrecht.
 Penningmeester: H.F. Roobeek, Krugerlaan 195, GOUDA
 Postrekening: 121449, ten name van "Nederlanda Katoliko"
 Geestelijk Adviseur: mons-ro H.J.A.M. Eras, te VUGHT.

1 FEBRUARI 1953.

Deze dag zal ons lang heugen. Een spanning als op de eerste dag van de oorlog. Hoe zal het aflopen? Vele gedachten gaan naar familie, vrienden en bekenden. We weten de afloop. het was verbijsterend. Gelukkig kunnen we U echter melden, dat zo ver thans bekend geen enkel lid van N.K. getroffen is door het meedogenloze water. Onze gedachten zijn bij de slachtoffers en naar vermogen werkt ieder mee tot een spoedig herstel.

De Haagse afdeling, die ons dit jaar zou ontvangen voor de alg. vergadering, heeft gemeend de daarvoor beschikbare gelden ad. f 100. = niet beter te kunnen besteden, dan ze te schenken aan het Rampenfonds. Inderdaad, goed gezien. Onder de indruk van de nationale ramp achtte ze het ook beter de voorbereidingen voor de feestavond op te schorten en zich alsnog te beraden of deze avond al of niet of mogelijk in een eenvoudiger vorm kan worden aangeboden. In verband hiermede, heeft het Hoofdbestuur in zijn vergadering van 21 Febr. jl. besloten de Alg. Vergadering te verzetten naar 30 en 31 Mei a.s. We vertrouwen, dat ieder het hiermede eens zal zijn. Nadere mededelingen omtrent tijd en plaats van H. Mis en vergaderingen, enz. zult U in het volgende nummer vinden. We vertrouwen, dat vele leden deze dagen zullen vrij maken, om aan onze jaarlijkse bijeenkomst bij te wonen.

De Voorzitter.

ESPERANTO IN DE IIe KAMER

Op 17 Febr. jl. viel, vrij onverwacht na een zeer lange tijd van wachten, de beslissing of het Esperanto op de Lagere School zou mogen worden onderwezen, of feitelijk Esperanto zou worden genoemd onder art. 2 van de Wet op het Lager Onderwijs. Zeer zeker heeft U de beslissing in de krant gelezen, nl. dit voorstel van de minister is verworpen met 37 tegen 44 stemmen. Voor stemden de P.v.d.A., de V.V.D. en de Communistische Partij. Tegen stemden de K.V.P., K.N.P., C.H., St.G., en de A.R. (behalve de heer Roosjes). Feitelijk dus zuiver een stemming van links tegen recht. Het is dwaasheid om hieruit te destilleren dat er thans althans 37 mensen in de IIe Kamer voor het Esperanto zijn, want het zijn er veel meer. Ook binnen de K.V.P.-fractie waren er zeer velen niet tegen het Esperanto. We moeten deze zaak zuiver zien als een wets-technische kwestie. De tegenstemmers waren niet tegen het Esperanto, maar tegen het opnemen daarvan in de lesrooster van de Lagere School. In tegenstelling met andere landen zijn in Nederland de onderwijsvakken precies in de Wet genoemd en heerst er een tamelijke eenvormigheid in leesroosters, en leerplan. Daar het ontbreekt aan leerkrachten, die het Esperanto zouden kun-

nen onderwijzen, is opneming in de wet voorlopig een dode mus om Esperanto nader tot zijn doel te brengen, nl. te dienen als wereldhulptaal. Bovendien kan niemand de garantie geven, dat het Esperanto internationaal als wereldhulptaal zal worden aanvaard. Ten derde is men allerwege aan het zoeken om veel intellectualistische ballast uit ons onderwijs te weren en te verwijderen. Om minder in de breedte uit te wijden, maar meer grondige kennis bij te brengen. Men wil het te overladen leerplan besnoeien en voelde er daarom niet voor dit leerplan met Esperanto uit te breiden. Ten laatste leven we niet meer afgesloten op een klein stukje grond aan de Noordzee, maar zouden er op het internationale politieke vlak consequenties kunnen volgen. Daarom schreven we reeds in het vorige nummer van E.K., dat er thans werk aan de winkel is, zodat bij de Unesco slechts deugdelijk voorbereide adviezen binnen komen. Klagen en jammeren over deze beslissing is thans niet aan de orde, we zullen moeten voortgaan. Alleen vragen wij ons af, of in deze wel juist gehandeld is. Als werkelijk het onderwijs in Esperanto een programmapunt is voor de P.v.d.A., waarom heeft ze het dan prijs gegeven aan de tegenstemmers, waarvan ze te voren de meerderheid kon weten? We vragen ons af, hebben de voorstanders van het Esperanto op de L.S. in de gegeven omstandigheden niet overvraagd? Als men hiervan werkelijk voorstander is, en het aantal is groter, dan men vermoedt, waarom is er dan geen contact geweest, om de mogelijkheid van dit onderwijs voorlopig te beperken tot het V.G.L.O. en het U.L.O.? Hiervoor was waarschijnlijk wel een meerderheid te vinden, wel was er de aandoening van de minister, dat het daadwerkelijke onderwijs slechts zou worden gegeven met toestemming. Maar in zulke kwesties bindt de Kamer zich niet gemakkelijk, meer, want de wet blijft, en de minister verdwijnt. We hebben dit zelf ervaren, toen bij een vorige wetswijziging minister Gielen verklaarde, dat voortaan het onderwijs in Esperanto op de school wel mogelijk zou zijn, zonder vermelding in de wet. Deze mogelijkheid mag theoretisch aanwezig zijn, maar de toezegging kon niet in de werkelijkheid worden omgezet. Dus voorlopig geen algemene invoering op de scholen. Gelukkig kan het wel op de kweekscholen. Laten we daar nu eerst eens werk van maken.

J.

Algemene Jaarvergadering.

Deze wordt uitgesteld tot 31 Mei a.s. te 's-Gravenhage.

Aftredende bestuursleden zijn de heren H.F. Roobeek te Gouda (penningmeester) en K. Vernooij te Den Haag (2e secretaris). Bovendien stelt de heer S. Nijhuis te Zwijndrecht zijn functie beschikbaar, daar hij hiervoor geentijd meer kan vinden. Candidaten vergezeld van bereidverklaring kunnen tot 20 April a.s. bij de secretaresse worden ingediend.

INGEKOMEN VOORSTELLEN:

Financieel: (afd. Rotterdam) N.K. stelle aan I.K.U.E. voor haar contributie zodanig te verhogen, dat het orgaan E.K. in haar vroegere uitvoering kan worden gedrukt.

Toelichting: Ondanks de verhoogde drukkosten hebben andere internationale tijdschriften hun gedrukte uitvoering en vorm behouden. Voor de goede gang in onze kath. beweging dienen we onze positie in deze te hernemen.

Preadvies: In vergelijking met de voornaamste niet-kath. tijdschriften zou I.K.U.E. dan voor haar een contributie moeten vaststellen van f 10.- en N.K. dit nog moeten verhogen voor haar eigen werk. Deze basis komt het H.B. voorlopig niet bereikbaar voor. Het is het H.B. ook bekend, dat de moeilijkheden bij I.K.U.E. niet zo zeer gezocht moeten worden in de verhoogde drukkosten, als wel in de maatschappelijke positie van de kath. esperantisten in de gehele wereld, de economische moeilijkheden van vele juist kath. landen, en de politieke moeilijkheden ook juist in verschillende kath. landen.

Bovendien is I.K.U.E. gedurende de laatste 15 jaren drie maal van bijna al haar bezittingen beroofd. Een voor ieder meer aanvaardbare oplossing zou zijn een groter aantal leden. Teneinde echter de eigen positie van N.K. te verbeteren, die indirect zeker ook ten goede zal komen aan I.K.U.E. stelt het H.B. voor de contributie voor haar leden m.i.v. 1 Juli a.s. te verhogen tot f 5.- per lid en voor donateurs en gezinsleden te bepalen op f 1.- per jaar

Propaganda(ingediend door verspreide leden.)

1. In ons tijdschrift E.K. worde een rubriek geopend voor uitwisseling van ideeën, ervaringen, enz. inzake de propaganda van Esperanto.
Préadvies: Het bestuur wil dit gaarne bij I.K.U.E. ter sprake brengen.
2. Het bestuur trachte te komen tot een gelijktijdige organisatie van Esperantocursussen in katholiek verband en gelijktijdig in meerdere landen. Zo spoedig mogelijk treden de cursisten met elkaar in correspondentie.
Préadvies: Het bestuur zal dit ook internationaal aanhangig maken. Veel zal afhangen van de persoon, die hier de organisatie op zich neemt.
3. Het bestuur ijvere er voor, dat er eens een geluidsfilm worde opgenomen van een internationaal congres, opdat door middel van de bioscopen het publiek in nauwer contact komt met het Esperanto en haar mogelijkheden.
Préadvies: Het bestuur wil de waarde van deze propaganda niet onderschatten, maar uitvoering zal wel onmogelijk zijn wegens gebrek aan geldmiddelen.
4. Het wordt nuttig geacht, dat een cursus voor sprekers voor propaganda-bijeenkomsten wordt gehouden. Verder een boekje met gegevens voor een debat ten behoeve van de propaganda.
Préadvies: Bij het N.C.K.E. is een lijst van sprekers aanwezig. In onze Libroservo kan men zeker omtrent andere gegevens iets vinden.
5. Onze bond verstrekke aan de leeszaalen goede leerboekjes voor het Esperanto.
Préadvies: Vele leeszaalen zijn hiervan voorzien. Waar niet, zal bij aanvraag door belanghebbende de directie wel tot aanschaffing willen overgaan.

I.K.U.E. (ingekomen van de afd. Rotterdam)

1. N.K. verzoeke aan I.K.U.E. een perspropaganda-commissie samen te stellen, die geregeld aan belangrijke instellingen en organisaties inlichtingen over de kath. esperanto-beweging doet toekomen.
Préadvies: Het H.B. wil dit voorstel gaarne doorgeven. Wel merkt het op, dat vele problemen eerst dan zijn opgelost, als niet een dienst is opgericht, maar personen daarvoor tijd en werkkraft werkelijk beschikbaar stellen.
2. N.K. verzoeke aan I.K.U.E. haar konsulservo deugdelijk in te richten en er bij voorkeur "fakservoj" als bv. vertaaldienst, toeristenhulp, enz. aan te verbinden.
Préadvies: Zie vorig voorstel.

I.K.I. (afd. Rotterdam).

N.K. verzoeke aan de redactie van E.K. om maandelijks daarin een slagzin ter aansporing van hulp aan deze instelling op te nemen.

Préadvies: Het H.B. meent te weten, dat de redactie hiertoe wel genegen is en gaarne een goede collectie slagzinnen ter keuze zal ontvangen.

AMENDEMENTEN OP DEZE VOORSTELLEN KUNNEN TOT 20 APRIL a.s. BIJ HET SECRETARIAAT WORDEN INGEZONDEN.

* * *

KARAVAN - REIS NAAR LOURDES

De gezamenlijke reis per touringcar is als volgt uitgestippeld:
Vertrek Zondag 9 Augustus uit Amsterdam. Over Maastricht en verder langs het zeer mooie Maasdal naar Reims. Bezoek aan de kathedraal. Logies.
10 Augustus: Epernay, Troyes, Vichy en Clermond Ferrand. Logies.
11 Augustus: Door het Centraal Massief (Mt.Dore), het hoogland van Auvergne, door de wonderschone Gorges du Tarn (kloven) naar Millau. Logies.
12 Augustus: Bezoek aan de Middeleeuwse stad Carcassonne en door de Pyreneeën naar Lourdes. Aldaar verblijf en excursies tot 17 Augustus.
Die dag over Auch (bezoek kathedraal) naar Roccamadour. Logies te Limoges.
18 Augustus: Kastelen van de Loire, Chartres en Versailles. Logies en verblijf te Parijs.
20 Augustus: Thuisreis over Brussel en Antwerpen.

Gelukkig zijn er reeds voldoende deelnemers zodat de reis definitief doorgaat. We verwachten echter nog verschillende aanmeldingen. De kosten zullen de f 250.00 per deelnemer, (alles inbegrepen, behalve zakgeld en dranken) niet te boven gaan.

* * *

Examens

Dit jaar zullen de Examens voor A en B als volgt plaats vinden.
Donderdag 14 Mei (Hemelvaartsdag) in Amsterdam en Groningen. (Aanmelden tot 2 April a.s.)
Zaterdag 13 Juni te Den Haag, en zo mogelijk te Eindhoven. Waar nodig ook speciale examens, bv. scholen. (Aanmelden tot 2 Mei a.s.)
Zaterdag 31 October te Utrecht, (Aanmelden tot 19 Sept. a.s.)
De examengelden bedragen voor A f 10.00 en voor B f 15.00.
Voor leden van onze bond resp. f 5.00 en f 7.50.
Aanmeldingsformulieren zijn te verkrijgen bij onze secretaresse, alsook bij de secr. van de examencommissie: mej. H.M. Mulder, Zilvermewestraat 29, te Badhoevedorp, alwaar de formulieren tijdig moeten zijn ingekomen.
We vertrouwen, dat dit jaar verschillende van onze leden hun studie zullen afsluiten met het afleggen van een examen en daarvoor zullen slagen.
Goed succes!

* * *

S - INO J. B. A. v. d. WIELEN - VAN GRIENSVEN, NIJMEGEN

estas unu el niaj plej fidelaj membroj. Ŝi aniĝis jam antaŭ 40 jaroj kaj ĉiam faris multan propagandon por nia movado. Kvankam nun pli ol 80-jara kaj kompreneble ne plu kapabla al granda laboro, Ŝi ankoraŭ daŭre montras vivan intereson kaj laŭpove helpas al la disvastigo de Esperanto. Ni deziras al Ŝi ankoraŭ longan vivon kun bona sano kaj dankas por ĉio kion Ŝi faris kaj faras por ni. Niajn pli junajn anojn ni instigas, sekvi Ŝian ekzemplon!

* * *

In Amsterdam volgen 50 politie-agenten een cursus in Esperanto, welke in het "Tijdschrift voor de Amsterdamse Politie" wordt gepubliceerd en met mondelinge lessen wordt toegelicht.
Leider van de cursus is ons lid J.S. Jansen, Karperstraat 9-I, Amsterdam Z.
In Den Haag worden wekelijks 2 lessen gegeven aan 20 man van het politiepersoneel door ons H.B.-lid K. Vernooy, Vlierboomstraat 234, Den Haag.

Kantoordrukkerij "Elinkwijk"
Amsterdamsestraatweg 480-482
Utrecht Telefoon 10757

La Miraklo en Boulogne sur Mer

Ĉu miraklo en tiu franca marista urbo, kie okazis 'Nia Unua'? Ho jes, mi komprenas. Vi volas aludi pri la mirinda fakto, ke jam tiam la partoprenintoj el ĉiuj landoj komprenis unu la alian! - Nepre ne! Sed mi volas raporti pri vera supernatura miraklo. Antaŭ ne longe mi aŭdis en parolado de Katolika pastro la vorton, ke la hodiaŭaj homoj ne plu povas miri. Certe! Kaj kvankam la progresoj de la atomfiziko ja havis la avantaĝon, ke la reprezentantoj de la scienco devis agnoski la ekziston de ĉiopova Dio, multaj aliaj ne tiom kleraj homoj en la nuna tempo de la atom- kaj hidrogenbomboj minimume silentas pri la efikado de Dio, kiu regas la mondon, kaj ĝuste tiu obstina silentado estas peka provoko! Do ni raportu pri okazaĵo, kapabla, ke ankaŭ ni modernaj homoj de la 20a jarcento lernu denove miri.....

En la pramalnova katedralo en Boulogne sur Mer el la 7a jarcento oni honoris gracobildon (statuon) de 'N.K. Sinjorino en la Ŝipo'. La franca revolucio detruis ambaŭ, katedralon kaj gracostatuan, de kiu restis nur unu mano. Sed en la jaro 1866 oni povis inaŭguri la novkonstruitan katedralon kaj kopion de la gracostatuo. Post Mariana kongreso oni decidis, aranĝi pilgrimadon kun la gracostatuo tra la tuta lando. Sed la eksplodo de la dua mondmilito malhelpis pluan migradon kaj la statuo devis resti en Lourdes, de kie oni povis reporti ĝin al Boulogne sur Mer nur la 8an de Decembro 1943. Sed tiel longe la Dipatrino ne volis atendi, por rekompenci ŝiajn fidelulojn elektante la turon de sia katedralo kiel heroon de la historio. ---

Dum Novembro en tiu jaro regis furiozaj uraganoj. La ventego blovis ĉiam en la sama direkto kaj fine 'sukcesis' rompi la turpinton de la katedralo. La turo havas longecon de cent metroj kaj estas konstruita de ferbetono. La rompaĵo estis longa 7 metroj! Estis rimarkinde, ke ĝi ne terenfalegis, sed en la direkto de la ventego malsuprenpendis! Kompreneble tuj la magistrato baris ĉiun trafikon, avertis la loĝantojn de la apudaj stratoj kaj informis specialfirmon en Parizo. Estis la 6a tago post la akcidento, la 13a de Novembro, do ĝuste la Fatimatago, kiam alvenis trupo de faklaboristoj el Parizo. Ĝia gvidanto, ĉefingenero, tuj suprenmontis por inspekti la difekton. Estis la 8a matene. Li konstatis gravan rompon de la ferbetona materialo. Do li reiris por preparoli kun siaj kunuloj la necesajn preparaĵojn. Estis nun la 8.30. Ĉiuj suprenmontis al la turpinto kiu pendis super ili en tiel granda alteco. Kaj en tiu momento okazis io tute paradoksa: Antaŭ la okuloj de ĉiuj, ĉeestintoj, kiuj frotis siajn okulojn, ĉar ili kredis revidi, la rompaĵo el si men iom post iom restariĝis, ĝis ĝi havis ree la antaŭan normalan staton, kaj la memleviĝo okazis eĉ kontraŭ la direkto de la ĉiam ankoraŭ forta vento!! Sed ni lasu rakonti la ĉefingenieron mem: 'Mi timis perdi mian racion vidante tion! Ĉu ni nur protio devis veni el Parizo kun niaj specialaparatoj por havi tiun aspekton de okazo, kiun mi nepre ne povas klarigi! Ĉu klarigi? Kiu sukcesus klarigi tiun miraklon? Ĉiuj 'klarigoj', kiujn la nekreduloj en aliaj kazoj ja tiel volonte citas, ekzemple: histerio, aŭto-sugestio, amassugestio, simpla trompo ktp. ja tute malkonsentas. Restas nur humila agnosko, ke estas vere, kion la devizo de la lastjara Katolikotago en Berlino diris: **D I O v i v a s !** ---

Sed nun alia demando: Mi mem legis la historion en la januara numero de la germana jurnalo 'Der Grosse Ruf' (La Granda Alvoko), Credo-eldonejo, Wiesbaden, de la nuna jaro. Kaj la artikolo asertas, ke la tuta franca gazetaro, raportis detale pri la miraklo! Kial do, mi demandas, ni ekscias ion pri tio nur nun, dek jaroj post la okazo? Ĉu ne ekzistas internacia gazetaro, radio ktp.? Certe, certe, la mondmilito kaj la postmilitaj zorgoj! Tamen, ni nur imagu, se jam tiam la UNO estus oficialigita Esperanton! Tiam ĉiu granda jurnalo havus Esperanto-kolonon en ĉiu numero, la sendstacioj regule sendus Esperantlingve ktp., kaj tiamaniere la tuta mondo jam de longe estus sciinta la 'Miraklon de Boulogne sur Mer'!

M. M. Mielert.

NEKROLOGO



En la aĝo de preskaŭ 75 jaroj mortis je la 26a de Januaro pasinta s-ro P. A. Schendeler el Eindhoven (Nederlando). Li naskiĝis en 's-Hertogenbosch la 26an de Februaro 1878. En tiu urbo li akiris la diplomon de instruisto. Tiel li deĵoris en Raamsdonkveer kaj Den Dungen, kaj kiel lernejestro en Mariaheide. Poste li fariĝis profesoro en geografio en la katolika kolegio 'St. Joris' en Eindhoven. Ankaŭ li sin multe okupis pri stenografio

Tamen plej konata li estis kiel ĝenerala-sekretario kaj kasisto de I. K. U. E. kaj dum jaroj li ankaŭ estis redaktoro kaj direktoro de nia revuo 'Espero Katolika'. Pro diferenco pri la estrado li abdikis tiujn postenojn en 1935. Tamen lia idealismo me forlasis lin. En 1937 dum nia kongreso en Hago, ni povis ĝui pro la altnivela prezentado de la klasika teatraĵo 'Jozefo en Dotan' de la plej fama nederlanda poeto Joost van den Vondel. Krom la traduko, li ankaŭ prizorgis la regionon. Ofte li estis kaŭzo de miskompreno, de kvazaŭ rivaleco. Vere ni devas konstati ke li estis geniulo kun multaj diversaj kapablecoj, kaj li uzis ilin ĝisfunde profite al nia movado, eĉ ĝis kelkaj horoj antaŭ lia morto.

Dio rekompencas lin kaj ni preĝu ke lia animo ripozu en Li !

* * *

Nia fervora membro Ulr. Hoffmann en Berlino komunikis al ni la mortonde sia bopatro s-ro Conrad Noeske, esperantisto de 1913, kaj estro de 'Berliner Esperanto-Verlag' (eldonejo). Eĉ dum la lastaj monatoj, kvankam malsana, li prizorgis diversajn eldonojn. Li ripozu en paco !

NI GRATULAS

S-ro Carl Aŭgust Kohler el Munkeno, kiu dum la solema S. Meso je la malfermo de nia XXIIIa IKKE en Munkeno en 1951a estis la kantoro, kaj kiu poste ofte kantis en Esperanto en Vieno, Munkeno, Berlino, Bayreuth, Saarbrücken, Roma, Vatikano kaj la Vatikana Radio, edziĝis je la 26a de Januaro pasinta en Romo kun f-ino d.rino Adelaide Antonelli, profesorino de beletristiko kaj eminenta esperantistino. Divervis por ili la hungara pastro Nikolao Bogliari, de la 'Servistoj de Maria' kiu predikis en Esperanto. Ankaŭ pastro Bogliari vizitis nian lastan kongreson kaj tie paroladis pri la vera vizaĝo de Jesuo Kristo. Ni deziras al niaj samcelanoj feliĉan kunvivadon.

* * *

Je la 26a de Februaro pasinta Kortega Konsilanto s-ro Hugo Steiner, fondinto kaj direktoro de la Internacia Esperanto - Muzeo en Wien (Aŭstrujo), festis sian 75 naskiĝtagon. Ni elkore salutas.

* * *


La antaŭa prezidanto havos 70 jarojn.

Je la 27a de Marto venonta nia antaŭa prezidanto de I. K. U. E., s-ro P. Heilker, festos sian 70an naskiĝtagon. La fortulo atingis la aĝon de la fortuloj. Ek de 1910a li estis grava gvidanto en nia movado, kiel prezidanto de Nederlanda Katolika, Prezidanto de la Ekzamena Komitato, kaj de 1935-1950 prezidanto de I. K. U. E. Krom la ofico de lernejestro li estis gvidanto de la katolikaj deputitoj en la Provinca Ĉambro de Nord-Hollando. Kaj post lia pensionigo li ankoraŭ faris gravajn laborojn kiel sekretario de la Konsilo de Laboristaj-Sindikatoj, kaj multe kunlaboris en la Katolika Sindikato.

Pro lia aĝo li rezignis al la gvidantaj oficoj, tamen restas ĉiam interesata en nia movado. Ni esperas ke li ankoraŭ dum longaj jaroj ĝuos la ripozon, post intensa laborado kune kun lia edzino.

Je tiu tago ni elkore gratulas lin kaj ni esperas ke je la memortago multaj el liaj amikoj tra la tuta mondo superŝutos lian domon per gratuloj.

J.



Nia XXIVa.

Bonvolis aliĝi al la Honora Komitato: Mons-ro Moussaron, Ĉefepiskopo de Albi. Ĝis la fino de Februaro aliĝis al la Pilgrim-Kongreso 35 personoj diverslandaj.

Ni atentigas vin ke ek 1-III-53 la kongreskotizo estas 900 francaj frankoj.

Jen la provizora konciza programo:

Merkredo, 12 Aŭgusto:

- 14 h. Malfermo de la akceptejo.
- 18 h. Komuna vizito al la groto.
- 20 h. Interkonatiĝa vespero, samtempe unua kunveno de la estraro de I.K.U.E.

Ĵaŭdo, 13 Aŭgusto:

- 9 h. Solena S. Meso.
- 11 h. Malferma kunsido.
- 12 h. Fotografado.
- 15 h. Estrarkunveno de I.K.U.E. kun la reprezentantoj.
- 17 h. Procesio de la S. Sakramento.
- 20 h. Procesio de la kandeloj.

Vendredo, 14 Aŭgusto:

- S. Mesoj en ĉiuj preĝejoj kaj je ĉiuj horoj.
- 10 h. Laborkunsido. Posttagmeze ekskursoj kaj libera vespero.

Sabato, 15 Aŭgusto:

Partopreno al ĉiaj solenaĵoj de la Festo en la Baziliko.

- 13 h. vizito al la tombo de Pastro E. Peltier kaj ekskurso tra la urbo.
- 16 h. Estrarkunveno de IKUE.
- 17 h. Procesio de la S. Sakramento.
- 20 h. Procesio de la kandeloj.

Dimanĉo, 16 Aŭgusto:

- 8.30 h. Solena S. Meso.
- 10 h. Ĝenerala Kunveno de I.K.U.E.
- 14 h. Vizito al la cirkaŭaĵo de la urbo.
- 17 h. Krucvojo (en Esperanto).

Lundo, 17 Aŭgusto:

- 9 h. Solena S. Meso
- 10 h. Ferma kunsido de la Kongreso.

NE FORGESU ENSENDI VIAN ALIĜILON SUFIĈE FRUE!

* * *

La Londona Esperanto-Klubo festas sian 50-jaran Jubileon. Ni gratulas tutkore! Ek de 1903 ĝi kunvenas ĉiuvendrede, senescepte eĉ dum la bombardoj kaj nur escepte je sankta vendredo kaj ĉijare kiam Kristnasko malhelpis la kunvenon. Antaŭmallonge ĝi fondis duan kunvenvesperon, nome je mardo, en kunlaboro kun la Brita Esperanta Scienca Asocio. Ni vidis la programon de ĉi tiu vintro kaj enviis la viglecon de la klubo. Je la 14a de Oktobro pasinta nia membro s-ro H.P. Saunders prelegis pri 'Fatima, Portugala vilaĝo'. Je la Paskaj Tagoj 1953a, de 2-5 Aprilo, la Jubileo estos festata. La kotizo por Britoj estos 19 ŝ. Alilandanoj ne pagos kotizon.

* * *

La ĵurnalo 'A Nacao' en Porto Alegre (Brazilo) donis en sia numero de 15-X-52 tre detalan raporton pri la IIA Eŭkaristia Mondkunveno Esperantista en Barcelona.

* * *

Post la UEA kongreso en Zagreb la Kristana Esperantista Ligo Internacia aranĝos internacian konferencon en Rüdlingen (Svisujo).



* * *

Radio kaj Esperanto

(detalojn en la antaŭa numero de Januaro 1953.)

ŜANĜO: La elsendo de socialistaj informoj de V.A.R.A. Hilversum okazos ne Lunde, sed Merkrede je la sama horo kaj ondolongo.

ALDONO: Merkrede: 23.30-23.50 Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11 Valencia (Hispanujo).
Bonvolu ensendi viajn sugestojn.




9. d.ro W. Solzbacher, Yonkers, USA.
10. D.ro Maggio, Newark, USA.
Sinceran Dankon!



KORESPONDADO

Por propagandi la praktikan uzadon de Esperanto sinjoro H. J. F. Wansink, Izaak Evertslaan 44, Arnhem (Nederlando) petas alsendon de ĉiaj faldfolietoj, prospektoj, ktp. kiuj estas eldonataj de firmaoj. Antaŭan dankon.

* * *



En sinsekvaj numeroj de la revuo ni publikigos la katalogon de nia Libro-servo. Ni esperas ricevi multajn mendojn. Oni agu laŭ jenaj instrukcioj. Por Nederlando: Rekte al la Libro-servo de N.K., Kasperspad 91, Dordrecht. (Ĉiuj afrankokostoj estos alkalkulataj.)

Por aliaj landoj: Mendoj rekte al Espero Katolika, Vleuten (Nederlando) (oni aldonu 10% por sendkostoj kaj ensendu samtempe la pa-ateston, pruvante ke la sumo atingis niajn reprezentantojn, kies adresojn vi trovos sur via membrokarto.)

x nur por kleraj personoj.

Romanoj, k. t. p.

Appleby:	Ĉu vi scias ? 200 demandoj kaj respondoj	f	0.50
Aszlanyi:	Sep Vangofrapoj, humorista		2.30
x Baekelmans:	Elektitaj noveloj		0.80
J. Baghy:	Printempo en la Aŭtuno, novelo		1.50
-	La verda Korpo, por progresantoj		2.25
x -	Verdaj Donkiĥotoj		2.--
St. Bergman	Tra sovaĝa Kamĉatko, 94 fotoj k. geogr. karto		3.80
Boatman:	La nekonata konato, en bela bindo		2.25
Bossiere	Sur la Feliĉvojo, trad. C. Meunier		0.40
Boudier-Bakker:	Surprizoj, trad. Tekla Flint bind. f 4.50		3.75
Bratescu-V.:	Niĉjo Mensogulo k. aliaj noveloj		0.40
H. Bulthuis:	Idoj de Orfeo, 540 pĝ. interesa; bonasp, uzitaj ekz.		1.90